

August Heinrich Hoffmann,

Vespera kanto

tradukita de Manfred Retzlaff

Ree vesperiĝas
 ĉie en la rond',
 paco subeniĝas
 kaj ripozas mond'.

Riveret' nur fluas
 ĉe la roko jen,
 kaj ĝi daŭre bruas
 plu kaj plu sen ĝen'.

Ne vespero iu
 endormigas ĝin,
 sonoril' neni
 je la tago-fin'.

Mia koro, tia
 estas ankaŭ vi!
 Pacon trovos mia
 koro nur en Di'.

...

August Heinrich Hoffmann,

Vespera kanto

tradukita de Manfred Retzlaff

Surkampare iĝas
 ree nun vesper',
 milde subeniĝas
 paco de l' eter'.

Nur de l' roko bruas
 rivereta flu',
 kaj la akvo fluas
 ĉiam ĉiam plu.

Ne haltigas iu
 ĝin je l' tagofin',
 kaj vesper' neni
 ripozigas ĝin.

Mia kor', senlace
 strebas ankaŭ vi,
 vi ripozos pace,
 nur se volos Di'.

...

*Traduko de la Germana poemo “Abendlied” de AUGUST HEINRICH HOFFMANN (Hoffmann von Fallersleben, *1798-04-02 – †1874-01-19) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (*1938-11-04) en 2013-01-27.*

Arg-645-1943 (2014-01-28 23:29:57)

La melodio estas aŭdebla en <http://ingeb.org/Lieder/abendwir.html>.

*Traduko de la Germana poemo “Abendlied” de AUGUST HEINRICH HOFFMANN (Hoffmann von Fallersleben, *1798-04-02 – †1874-01-19) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (*1938-11-04) en 1988-04-16.*

MR-212.1 / Arg-645-1302 (2012-11-04 23:01:54)

Pri la aŭtoro vidu la vikipedian retejon http://eo.wikipedia.org/wiki/August_Heinrich_Hoffmann_von_Fallersleben. La melodion verkitan de Christian R. Rinck oni povas aŭdi en <http://www.musicanet.org/robokopp/Lieder/abendwir.html>. Pri la komponisto rigardu: http://de.wikisource.org/wiki/ADB:Rinck,_Johann_Christian_Heinrich.